

I^pI

Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 35 (kvara serio), numero 2 (135), 2026
ISSN 1385-2191

Eldonas

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
interlingvistiko.net ♦ [@CED_interling](https://twitter.com/CED_interling)

Redaktas

Başak ARAY  ♦ KIMURA Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ) 
Jorge Antonio LEONI DE LEÓN  ♦ Bengt-Arne WICKSTRÖM 

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

I	Eventoj	3
1	Espéranto et mathématiques: histoire, linguistique, logique et didactique (Esperanto kaj matematiko: Historio, lingvistiko, logiko kaj didaktiko), 2026-05-22	3
1.1	Organizantoj	3
1.2	Loko	3
1.3	Priskribo	3
1.4	Programo	3
2	Ekspozicio «Bicikle azien per Esperanto (1928-1932)»	4
3	Arta fot-ekspozicio de verkoj de Antonio Leoni de León en la Universidad de San Carlos de Guatemala, 2026-02-04 – 28	4
3.1	Loko	4
3.2	Temo	4
II	Universitata kaj esplora agado	5
III	Kulturo	5
IV	Personoj	5
1	Intervjuo kun Dominique Simeone en retejo «Vocal»	5
2	Antonio Leoni de León estis nomumita redaktoro de LPLP	5
V	Bibliografiaĵoj	6
1	Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj	6
2	Fakrevuaj artikoloj	6
3	Libroj	7
4	Libroĉapitroj	7

5	Revu-numeroj	7
5.1	Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik	7
5.2	Language Problems and Language Planning	7
5.2.1	Language Problems and Language Planning, 49:3 , 2025. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.	7
5.2.1.1	Enhavo	7
5.3	Beletra Almanako	9
5.3.1	<i>Beletra Almanako</i> , 54 , oktobro 2025. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325.	9
5.3.1.1	Enhavo	9
5.4	Esperantologio / Esperanto Studies	11
5.5	Investigationes Linguisticae	11
6	Novajletoj	11
6.1	Global coalition for language rights (GCLR)	11
6.2	Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)	11
6.2.1	La lettre d'information de l'OEP, 105 , 2026-01/02.	11
6.2.2	La lettre d'information de l'OEP, 106 , 2026-03/04.	11

I EVENTOJ

1 ESPÉRANTO ET MATHÉMATIQUES: HISTOIRE, LINGUISTIQUE, LOGIQUE ET DIDACTIQUE (ESPERANTO KAJ MATEMATIKO: HISTORIO, LINGVISTIKO, LOGIKO KAJ DIDAKTIKO), 2026-05-22

1.1 *Organizantoj*

L'IREM de Caen Normandie kadre de nacia kongreso de esperanto

1.2 *Loko*

Université de Caen Normandie, Campus 2

1.3 *Priskribo*

Ĉi tiu studtago celas, per ses prezentoj, montri la interplektiĝon inter matematiko kaj esperanto ekde la fino de la 19-a jarcento: la rimarkindan esperantistan interkonekton kun eŭropaj matematikistoj (en la plej larĝa senco), la ligojn kun certaj publikaĵoj (periodaj aŭ ne), la asocian mondon, la demandojn pri tradukado de matematikaj terminoj kaj la demandojn pri ebla evoluo de la lingvo.

1.4 *Programo*

- 09.30 JEAN-PHILIPPE GEORGET: *Introduction à la Journée d'étude (Enkonduko en la studtagon)*
- 09.45 FRANÇOIS PLANTADE : *L'Espéranto et ses traces dans les Nouvelles Annales de Mathématiques (Esperanto kaj ĝiaj spuroj en la Nouvelles Annales de Mathématiques)*
- 10.30 FRANÇOIS LO JACOMO: *L'Association internationale des mathématiciens espérantistes (Internacia Asocio de Esperantaj Matematikistoj)*
- 11.15 *Pause café (Kafopaŭzo)*
- 11.30 LAURENT MAZLIAK: *Le mathématicien Serge Bernstein en Ukraine : utilisation de l'espéranto dans le contexte soviétique (La matematikisto Serge Bernstein en Ukrainio: La uzo de esperanto en la sovetia kunteksto)*
- 12.15 *Déjeuner (Tagmanĝa paŭzo)*

- 13.45 RÉMI BLONDEL: *Le mathématicien espérantiste Louis Couturat (1868 – 1914) et son oeuvre (La esperantista matematikisto Louis Couturat (1868 – 1914) kaj lia verko)*
- 14.30 FRÉDÉRIC MÉTIN: *La controverse sur le choix entre espéranto et Ido au début du XXe siècle (La polemiko pri la elekto inter esperanto kaj ido komence de la 20-a jarcento)*
- 15.15 *Pause café (Kafopaŭzo)*
- 15.30 MARC BAVANT: *Le dictionnaire Matematika vortaro kaj oklingva leksikono (2003) (Matematika vortaro kaj oklingva leksikono (2003))*
- 16.15 JEAN-PHILIPPE GEORGET: *Clôture de la Journée d'étude (Fermo de la studtago)*

2 EKSPozICIO «BICIKLE AZIEN PER ESPERANTO (1928-1932)»

La ekspozicio Bicikle azien per Esperanto (1928-1932) kiu okazas en la salonoj de Nacia Biblioteko de Pollando en Varsovio estas plilongigita ĝis 2026-04-23. Vidu Ipl **34:1**, paĝo 10, kaj Ipl **35:1**, paĝo 3. [Pliaj informoj](#). En *Gazeta Wyborcza* aperis [artikolo](#).

3 ARTA FOT-EKSPozICIO DE VERKOJ DE ANTONIO LEONI DE LEÓN EN LA UNIVERSIDAD DE SAN CARLOS DE GUATEMALA, 2026-02-04 – 28

3.1 *Loko*

La Universidad de San Carlos de Guatemala (USAC) estas la plej malnova kaj granda universitato de Mezameriko. En 1620 komenciĝis la lecionoj en la Colegio de Santo Tomás de Aquino laŭ ordo de la reĝo Filipo la 4-a de Hispanio en la urbo hodiaŭ nomata Antigua Guatemala, tiu bela urbo estas inkludita en la Monda Havaĵo de Unesko. Nun tiu kolegio estas kultura centro apartenanta al la havaĵo de USAC. Temas pri grava kultura kaj historia loko en Gvatemalo (kaj Mezameriko).

3.2 *Temo*

La temo de la arta fot-ekspozicio estas *Ekziloj, memoroj kaj revenoj* kaj ĝi estis inaŭgurita je la 4-a de februaro. Temas pri 19 verkoj. [La katalogo](#).

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

III KULTURO

IV PERSONOJ

1 INTERVJUO KUN DOMINIQUE SIMEONE EN RETEJO «VOCAL»

En [intervjuo](#) kun Scot Douglas Jacobsen Dominique Simeone argumentas, ke esperanto antaŭenigas humanismon, lingvan justecon kaj transliman interretnan komunumecon pli bone ol maŝina tradukado.

2 ANTONIO LEONI DE LEÓN ESTIS NOMUMITA REDAKTORO DE LPLP

Antonio Leoni de León estas la nova redaktoro de *Language Problems and Language Planning*, sekvante Michelen Gazzolan, kiu fariĝis la nova ĉefredaktoro, vidu *Ipl* **35:1**, Sekcio 5.2.1. Ni gratulas al li kaj al LPLP.

V BIBLIOGRAFIAĴOJ

1 DISERTACIOJ KAJ DIPLOMLABORAĴOJ

2 FAKREVUAJ ARTIKOLOJ

COLLA, Marcus T. (2026). «Reflections: Back to Babel: New studies on Esperanto, internationalism and global languages in the nineteenth and twentieth centuries», angla. En: *The English Historical Review* 0. Aperos. DOI: doi.org/10.1093/ehr/ceag001.

Reen al Babelo: Novaj studoj pri esperanto, tutmondigo kaj tutmondaj lingvoj en la 19-a kaj 20-a jarcentoj

Pensoj pri nova literaturo pri esperanto.

STĘPKOWSKA, Agnieszka (2026). «Family language policy of bilingual couples using Esperanto as a lingua franca», angla. En: *Applied Linguistics Review* 17. Aperos. DOI: doi.org/10.1515/applirev-2025-0201.

Familia lingvopolitiko por dulingvaj paroj uzantaj Esperanton kiel lingvofrankaon

Ĉi tiu artikolo ekzamenas kiel la uzo de tria lingvo en dulingvaj rilatoj influas la infankreskigon. Bazante sur profundaj intervjuoj kun tri dulingvaj paroj parolantaj esperanton, la studo fokusiĝas sur ilia familia lingvopolitiko (FLP) por analizi la uzon de privata *lingua franca* (LF) por konstrui komunan lingvan kulturon. Montrante nuancitan bildon de la infanedukaj strategioj adoptitaj de ĉi tiuj paroj, la studo emfazas gepatrajn decidojn kaj provojn solvi problemojn pri komunikado en la familio, inkluzive de infanoj.

La studo emfazas la gravecon de kunrespondeco por la FLP inkluzive de la LF-uzon inter la partneroj. En la studo, la fokuso estas sur la trilingva kunteksto kiel sekvo de la Unu-Persono-Unu-Lingvo (OPL) strategio rilate la infanojn, kaj sur la retenado de esperanto inter la gepatroj.

Kvalitativa metodo kun aspektoj de enhav-bazita analizo estis adoptita por analizi la elektitajn intervjuerojn. Oni argumentas, ke paroj parolantaj esperanton estas tre aktivaj en siaj klopodoj kreskigi infanojn dulingve, samtempe konstruante sian propran etoson por sia LF-uzo.

3 LIBROJ

FIANS, Guilherme, Bernhard STRUCK kaj Claire TAYLOR (2025). *Postcards, translators and Esperanto pioneers: An alternative history of international communication*, angla. London: University of London Press. DOI: doi.org/10.63674/wujq4585.

Poŝtkartoj, tradukistoj kaj pioniroj de esperanto: Alternativa historio de internacia komunikado

Historio de esperanto kaptita en poŝtkartoj.

LEONI DE LEÓN, Jorge Antonio kaj Alejandra SUÁREZ ARIAS (2026). *Exilios, memorias y retornos / Exils, mémoires et retours / Ekziloj, memoroj kaj revenoj: Exposición fotográfica personal de Antonio Leoni de León*, hispana, franca kaj esperanto. Antigua Guatemala: Jorge Antonio Leoni de León. ISBN: 978-99939-2-582-8. URL: <https://mulkin.info/expos/USAC26/EXPO-ALDL-USAG-26-Catalogo.pdf> (vizitita 2026-03-23).

Temas pri katalogo de fotekspozicio. Krom fotoj ĝi ankaŭ enhavas kelkajn poemojn.

4 LIBROĈAPITROJ

5 REVU-NUMEROJ

5.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*

5.2 *Language Problems and Language Planning*

5.2.1 **Language Problems and Language Planning**, 49:3, 2025. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.

5.2.1.1 *Enhavo*

- Claire de Goumoëns, Laurent Gajo, & Myriam Radhouane: *Towards an integrated approach to heritage languages in multilingual education policies: The case of Geneva*
Survoje al integra aliro al heredaĵlingvoj en plurlingvaj edukpolitikoj: La kazo de Ĝenevo
Enkonduko
- Aurélie Pont & Marion Dutrévis: *Aperçu statistique et démographique des élèves allophones à Genève*

Statistika kaj demografia superrigardo de denaske ne-franclingvaj studentoj en Ĝenevo

En Svislando, la kantono de Ĝenevo, kie la oficiala lingvo estas la franca, estas historie rigardata kiel regiono karakterizata de fortaj multkulturismo kaj plurlingvismo. Tamen, alilingvismo, komprenata ĉi-kuntekste kiel ĉeesto de parolantoj de aliaj lingvoj, ne povas esti traktata kiel neŝanĝiganta realo. La proporcio de alilingvaj lernantoj en la ĝeneva

sistemo de publikaj lernejoj daŭre kreskas (de 38% en 2000 al 47% en 2022), kaj samtempe la lingva konsisto de la lerneja ĉeestantaro plidiversiĝis tra la jaroj. Surbaze de tiu konstato, la nuna kontribuado liveras ĝeneralan kaj statistikan superrigardon de la ĝeneva eduka sistemo, fokuse al la novalveninta kaj alilingva lerneja partoprenantaro.

Ĉerpante statistikajn donitaĵojn haveblajn deposte 1969, la analizoj prilumas la lingvan diversecon de Ĝenevo kaj la socidemografiajn transformojn de ĝia eduka pejzaĝo. Dum la ĉeesto de lingvoj aliaj ol la instrulingvo povas aldoni komplikecon al la ĉelerneja sperto, nepras konsideri tiun karakterizon en apudeco kun individuaj kaj sistemaj variabloj. Tiumaniere, multifaktora aliro kiu kombinas malsamajn variablojn ebligas detalan priskribon de la diverseco trovebla en la ĝenevaj lernejoj kaj de la edukaj trajektorioj de la migrula enloĝantaro.

Finfine, la priskriba laboro kerne de la nuna kontribuado reprezentas esencan paŝon por diskonstrui homogenan kategorian alrigardon al studentaj migruloj aŭ studentoj de migrulaj originoj.

- Mariana Fonseca Favre, Laurent Gajo, Maria de Lurdes Gonçalves & Anne Grobet: *Estrukturas de acolhimento, ensino regular e ensino de língua de herança: Rumo a uma política articulada em prol do plurilinguismo?*

Subtenstrukturoj, regula edukado kaj instruado de denaskaj lingvoj: Survoje al kunordigita politiko favore al plurlingveco?

Tiu ĉi artikolo esploras, laŭ pluraj perspektivoj, kiel la eduka sistemo de Ĝenevo frontas la plurlingvismon de enmigrintaj studentoj. Unue la artikolo resumas la instituciajn kaj politikajn kadrojn – naciajn, regionajn (romandajn) kaj kantonajn – kiuj muldas la klerigon de alilingvaj studentoj. Poste ĝi ekzamenas kiel tiuj kadroj estas realigataj trans tri ŝlosilaj medioj: normalaj klasĉambroj, klasoj por novalvenintoj, kaj klasoj pri heredaĵaj lingvoj kaj kulturoj. Rekonante, ke subtenado de la plurlingveco de studentoj postulas koheran interagadon inter tiuj tri medioj, la artikolo esploras kiel ligoj inter la tri estas nun starigataj kaj kiel ili povus esti plue evoluigataj. La esploro ĉerpas el konkretaj edukaj praktikoj inspiritaj de la principoj de plurlingvisma didaktiko. Tra la tuta artikolo ni kreas dialogon inter instruaj demandoj kaj edukaj demandoj rilate multlingvismon kaj migradon.

- Myriam Radhouane & Manon Tallant: *From conception to implementation: Examining an educational policy for refugee student integration*

De koncepto ĝis efektivigo: Esploro de eduka politiko por integriĝo de rifuĝintaj studentoj

Jam de pli ol jardeko, la Kantono de Ĝenevo frontas novajn migradajn fluojn, precipe el mondaj regionoj kiujn oni identigas kiel «en krizo». Oni atribuas al la novalvenintoj diversajn jurajn statusojn, ekde azilopetantoj ĝis rifuĝintoj laŭ la difinoj de la Ĝeneva Konvencio. Tiuj mondaj migradaj krizoj signife skuas edukajn sistemojn. Ili defias, reformas, kaj, foje, rezultigas evoluon de novigaj edukaj politikoj kiuj celas bonvenigi kaj integri enmigrintajn studentojn, subtenante ilian lernadan sukceson.

En la nuna kontribuo, ni proponas analizi la Svislandan Integriĝan Programon (Agenda Intégration Suisse: AIS) tiel kiel realigas ĝin je bazlerneja nivelo la Kantono de Ĝenevo. Motivate de personigita aliro al migradaj padoj iniciatita de la Svisa Konfederacio, la

kantono aplikis tiun procedon al lernantoj markitaj de perforta migrado, por subteni ilian «lernadan sukceson». Egale uzante kaj dokumentitajn kaj empiriajn donitaĵojn, ni proponas analizan perspektivon al evoluigo de tiu nova kleriga politiko, kun specifa fokuso je uzo de denaskaj lingvoj en la lernejoj. En la nuna kontribuo, ni kaptas la voĉojn de bazlernejaj instruistoj dum ili spertas la novan politikan kadron kaj ĝiajn efikojn.

- H el ene Delage: *L' evaluation du langage chez l' el eve multilingue: L'apport des  evaluations en langue d'origine (EVLO)*

Lingva taksado  e plurlingvaj studentoj: La kontribuo de taksadoj en ilia gepatra lingvo

Lige kun  generalita politiko de integrado de alilingvaj lernantoj, specifajn defiojn levas lingvolernadaj malfacilaĵoj (t.n. DLD) inter multlingvaj lernantoj. Notinde, pritakso de lingvaj perturboj devas distingi dumtempaj malfacilaĵoj ligitaj al mankanta malfermo al la dua lingvo ( i-kaze la franca en francparolanta Svislando) disde la  esto de persista evoluiga lingva perturbo, kiu aperas en  . 8 procentoj de infanoj de lerneja a o.  i-kaze, la perturbo manifesti as en  iuj lingvoj kiujn la infano parolas.

Ekzistas pluraj eblecoj por pritaksi lingvajn perturbojn de multlingvaj infanoj. La «ora normo» estas pritaksi la infanon en  iuj ties lingvoj, sed ties realigo estos eventuale malfacila en la praktiko. Tamen, la Servo pri Instruado kaj Pritaksado de la  eneva Fako pri Edukado, Trejnado kaj Junularo ja sukcesis evoluigi pritaksojn en la originala lingvo (EVLO) por ne-francparolantaj lernantoj, precipe tiuj kiuj lastatempe alvenis en la  enevan edukan sistemon. La kontribuo de tiu  i ilo, kvankam plibonigebla ( i ne estas normigita), estas plene noviga. Fakte, depende de la transe ligita informaro kolektita por  iu lernanto,  i kapablas rezultigi direktigon al parola kaj lingva pritakso, sed anka  konstato, ke «simple» necesas plifortigi la sperton de la infano pri la franca lingvo (sen apartaj aliaj perturboj). Tiu transe ligita informaro anka  ebligas ne ekskluzivi aliajn fontojn de malfacilaĵoj, sendepende de lingvaj malfacilaĵoj, kaj sekve direktigi la lernanton al specialistoj la necese.

La komprenado de EVLOj havas gravegan socian signifon,  ar ili devus ebligi, longperspektive, redukti la nombron de multlingvaj lernantoj postsekvataj de lingvoterapiaj servoj sen ajna pruvita perturbo (superindikado de DLD) kaj direkti al lingvoterapio tiujn kiuj vere bezonas  in (subindikado de DLD). Ili anka  reprezentas ilon por valorigi la denaskan lingvon de la koncerna lernanto.

5.3 *Beletra Almanako*

5.3.1 *Beletra Almanako*, 54, oktobro 2025. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325.

5.3.1.1 *Enhavo*

- Prezento
 - Probal Da gupto
- Originala prozo
 - Jado (Wei Yubin): *Verda rubando*

- Gong Xiaofeng (Arko): *Monta vento*
- Spomenka Štimec: *Starigi monumenton al Esperanto*
- Sara Spanò: *Vaglumo*
- Originala poezio
 - Jouko Lindstedt: *Ne vi foriros*
 - Jouko Lindstedt: *Fratin' Feliĉo*
- Tradukita prozo
 - László Krasznahorkai: *Herman, la ĉasgardisto (Unua tekstoversio)*; tradukis István Ertl
 - László Krasznahorkai: *Malsupren laŭ arbara vojo*; tradukis Judit Schiller
 - Cao Naiqian: *En kavo de stako el avenpajlo*; tradukis Minosun
- Artikoloj kaj eseoj
 - István Ertl: *Je la komenco de komprenvojo*
 - Probal Daŝgupto: *Kvindek jarojn post Kalocsay*
 - Lusin: *Memore al fraŭlino Liu Hezhen*; tradukis Mumei Shi [木梅士]
 - Mikaelo Bronŝtejn: *Omaĝe al Jacques (1940-2026)*
 - Ulrich Lins: *Scivolo, toleremo, sprito: Post la forpaso de Roman Dobrzyński (1937-2025)*
 - Jens S. Larsen: *Historio de nia neŭtraleco*
- Recenzoj
 - Probal Daŝgupto: *Aktoj de la Simpozio de ILEI 2022-2023* de Alessandra Madella (red.)
 - Sébastien Moret (tradukis Gabriel Labrie): *Kurso de ĝenerala lingvistiko* (tradukis Fernando Pita) de Ferdinand de Saussure
 - Antonio Valén: *Gadir* de Jorge Camacho
 - Trevor Steele: *Mi konis Moseon* (tradukis Tanuló) de Tek-sek (registrita de Ursula Roberts)

5.4 *Esperantologio / Esperanto Studies*

5.5 *Investigationes Linguisticae*

6 NOVAĴLETEROJ

6.1 *Global coalition for language rights (GCLR)*

6.2 *Observatoire européen du plurilinguisme (OEP)*

6.2.1 [La lettre d'information de l'OEP, 105, 2026-01/02.](#)

6.2.2 [La lettre d'information de l'OEP, 106, 2026-03/04.](#)

Ipi estas eldonaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191.

Por ricevi informon pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdatoj por numero de sekva monato estas: 28-a de februaro, 31-a de majo, 30-a de aŭgusto kaj 30-a de novembro. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ en alia lingvo.

Estraro de CED

**Mark FETTES (direktoro) ♦ Guilherme FIANS ♦ Klaus SCHUBERT
Humphrey TONKIN ♦ Michele GAZZOLA.**